

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

*Regulaj Klasoj en sabato: Mezaj Klasoj 1, 2 kaj 3 / Jokohama Salono.

*Regula Klaso en merkredo.

*PAROLI KUN S-RO ALEX HUMET

feb. 11 (sab) 15h00-17h00 ĉambro 603

Belga samideano vizitos nian rondon, do ni

aŭskultos lian prelegon kaj havos ŝancon paroli kun li.

*FOIRO DE URBANAJ AGADOJ

mar. 11 (sab) 10h00-16h00 ĉambro 306

Ĉe nia regula kunveno, okazas multaj agadoj de diversaj kulturaj kaj edukaj grupoj, inkluzive de nia Esperanta grupo. En tiu ĉi tago, ni havos interkonan agadon, kaj invitas aliajn homojn viziti nin. Ĉiujare tia agado okazas, sed antaŭ unu jaro, ĝi ne okazis pro la postefiko post la granda tertremo.



TIEL OKAZIS



en Hama-Ronda Vespero

jan. 21 (sab) 17h00-18h00 ĉambro 710

prezentanto: s-ro Karibe Riiĉi

temo: filmo "La Alpoj Svisaj"

S-ro Karibe prezentis la videofilmon titolitan "La Alpoj Svisaj", kiu estas kreita per esperantistoj de Lausanne, Svislando. La filmo estis interesa pro novaj vortoj por komencantoj, nome vortoj rilate al la geografio de la Alpa distrikto, kaj la enhavo de natura forto lerte filmita. Partoprenantoj havis ĝuojn renkontiĝi kun ne-familiaraj vortoj kaj mirindaj naturaj kreaĵoj.

Post tiu filmo, li prezentis sian privatan fotovideon pri sia historia kontakto kun Alpoj ekzemple vizito al Cervinio por skii, konkero de Materhorno, vizito al Torinaj esperantistoj kaj lastjara vizito al Grindelvaldo, Aime kaj

Chamonix. Pri Monto-Blanka, li partoprenis en la piedmigrado de parizanoj, kiun gvidis pariza esperantisto.

En la postprograma bankedo, li aldone prezentis sian rakonton pri vizito al KCE (Kultura Centro Esperantista) kaj montogrimpado de Faulhorn en Grindelvaldo.

(el raporto de s-ro Karibe kaj s-ino Aida)

en Interklasa Lernado

jan. 21 (sab) 16h30-17h00 ĉambro 710

ludgvidanto: s-ro Sibayama Zyun'iti

enhavo: Estis lingva ludo. La ludgvidanto donas demandon, ekz-e; "Kie vi naskiĝis? Tiuj, kiuj naskiĝis en Jokohamo iru tien" (kaj montras iun flankon de la ĉambro), kaj "kiuj ne naskiĝis en Jokohamo iru tien" (kaj montras la alian flankon de la ĉambro). Tiel sinsekvaj korpomovaj demandoj.

■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti

■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458

■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

JARKUNVENO de Jokohama Esperanto-Rondo

jan. 28 (sab) 15h00-17h00 ĉambro 710

Okazis la plej supera decidokunveno de la Rondo por la kalendara jaro 2012. Ĉeestis 22 membroj kaj venis 17 mandataj rajtigiloj el 58 membroj. En ĝi oni aprobis jenajn aferojn.

- (1) agad-raporto kaj kasraporto de 2011
 - (2) buĝeto kaj plano de 2012
 - (3) aliĝo al Japana Esperanto-Instituto kiel ties grupa membro
 - (4) ŝanĝo de kelkaj el la estraranoj:
- **Prezidanto*: Eksiĝis s-ino Aida Yayoi, kaj enoficiĝis s-ro Doi Hirokaz. Li ankaŭ estas la nove asignita estro de Informa Fakto.
- **Estro de Eduka Fakto*: Eksiĝis s-ro Suzuki Keiĉiroo, kaj enoficiĝis s-ino Doi Ĉieko.
- **Revizoro*: Eksiĝis s-ro Aida Kiyosi, kaj enoficiĝis s-ino Hirose Kanae.
- **La Administraj Komitatanoj de-nunaj*: s-ino Miyazaki Hideko (ĉefo), s-ino Torii Husako (kasisto), s-ino Doi Ĉieko (pri eduko kaj eldono), s-ro Nanba Humiharu (sen speciala tasko).

PRI NIAJ MEMBROJ

(el la raporto farita en la jarkunveno)

En 2011, Jokohama Esperanto-Rondo (mallonge: Hama-Rondo) havis 58 membrojn, inkluzive de la 7 familiaj membroj. Ĝi havis 10 abonantojn de la organo.

El ili, partoprenintoj en esperantaj kongresoj estis jenaj:

- *En la Kongreso de la Regiono Kantoo (kiu inkluzivas Jokohamon kaj Tokion), en junio, en Saitama: 10 personoj.
- *En la Universala Kongreso, en julio en Kopenhago, Danlando: 10 personoj.
- *En la Komuna Kongreso Japana-Korea, en oktobro en Seongnam, Koreio: 14 personoj.



RAPORTO

“Mirinda Ĉapelo” en retejo, kaj ties aŭtora rajto


SIBAYAMA Zyun’iti

Ni en Jokohama Salono kuntradukis “Mirinda Ĉapelo” de TOYOSIMA Yosio, kaj aperigis ĝin sur tiu ĉi “Novaĵoj Tamtamas” (apr.-jun, 2011). Lastatemp ĝi aperis en retejo nomata Biblioteko Sakura, projekto por enkomputiligi kaj publikigi esperantajn literaturaĵojn en Japanio. Vidu tion en <http://vastalto.com/librejo/>.


Nu, ties aŭtora rajto de la originalo estis elĉerpita, 50 jarojn post lia forpaso en 1955. Sed naskiĝis la aŭtora rajto al la esperanta traduko, kunposedata de ni, la 7 personoj, en 2011. Kaj tia stato leĝe daŭros por 50 jaroj, post la verkado. Sed teni tion estas praktike

malfacile. Cetere, estas ankaŭ dezirinde, ke nia verko utilu al la publiko. Tial ni en Jokohama Salono diskutis kaj konsentis, ke ĝi aperu, laŭ jena principo pri kopirajto: “Krea Komunaĵo - Atribuite”. Ĉi tie “atribuite” signifas, ke la nomo de la aŭtoro estu atribuita al la verko. Do oni sciu, kiu estas la aŭtoro (en nia kazo, la kuntradukintoj). Plie la marko signifas, ke oni rajtas reprodukti la verkon sen peti permeson de la aŭtoro. La reprodukto eĉ povas esti profita, nome oni rajtas vendi ĝin por akiri profiton.

BELETRO



Frukto de pirarbo



Pri la aŭtoro Osanai Kaoru (1881~1928)

La aŭtoro, kiu estis reĝisoro, dramisto kaj novelisto, naskiĝis en la urbo Hirosima kaj diplomiĝis el la fako de la angla literaturo de Universitato Tokio. En 1909 li fondis la Liberan Teatron kunlabore kun Iĉikawa Sadanĵi la Dua kaj prezentadis okcidentajn novajn dramojn. En 1924 li fondis Cukiĵi-Teatron kun Hiĵikata Joŝi kaj prezentadis la dramojn de Anton Ĉekhov kaj Maksim Gorkii.

(原作：小山内薫『梨の実』, 1918)

verkis Osanai Kaoru
esperantigis AIDA Kiyoshi

Tio okazis, kiam mi ankoraŭ estis 6- aŭ 7-jara. Iun tagon mi petis mian nutristinon preni min al la festo de Sanktejo de Ĉiela Dio.

Svarmis multe da homoj sur la tereno de la sanktejo. Troviĝis la vendejoj de ameo, enkonke kuirita turbo*, kaj ungvento efika tuj resanigi tranĉovundon. Ankaŭ troviĝis vicoj da spektaklejoj de simia teatro, akrobataĵo de japana paruo, fantoma longkola kapo, monstro kaj montro-scenoj de infero kaj paradizo, kiujn oni apenaŭ spektis lastatempe.

Dum mi spektis ĉi tie kaj tie kondukate permane de mia nutristino, mi hazarde rimarkis, ke multaj homoj kolektiĝis ĉe la libera tereno malantaŭ la sanktejo.

Kiam mi alproksimiĝis al ili, maljunulo kaj knabo, eble lia nepo, staris en la ebenejo ne protektita kontraŭ la suno. Ili estis ĉirkaŭataj de multe da spektantoj. Mi ne povis bone spekti, ĉar antaŭ mi staris multaj spektantoj. Tial min portis la nutristino sur sian dorson. Bone aŭdiĝis la parolo de la maljunulo.

“Nu, karaj ĉeestantoj. Mi faros ion ajn, kion vi ĉiuj volas. Se iu el vi volas manĝi la oĝron de la monto Ooe, mi donos al vi la kuiritan oĝron per vinagrita misoo. Se vi volas manĝi la urson de la monto Aŝigara, mi tuj servos ĝin en bovlo.”


Tiam unu el spektantoj kriis laŭtvoĉe. “Do, avĉjo, alportu la frukton de pirarbo.”

Estis vintro kaj restis sur la tero tie kaj ĉi tie la neĝo falinta antaŭ kelkaj tagoj. Kaj la avĉjo mienis tro embarasite, ĉar alporti la frukton de pirarbo en la kulmino de vintro estus pli malfacile ol manĝi oĝron kuiritan per vinagrita misoo, aŭ manĝi supon de kuirita urso de la monto Aŝigara.

La avĉjo balbutis dum ioma tempo kaj abrupte diris kun rideto kvazaŭ bona ideo venis al li. “Konsentite, sed mi ne povis akiri la frukton de pirarbo ĉi tie sub tia frosta ĉielo. Sed mi scias la lokon, kie abundas je fruktoj de pirarbo.” Montrante la ĉielon per la fingro, li diris, “La loko estas la ĝardeno en la ĉielo. Nun iu iros tien kaj ŝtelos kaj alportos la fruktojn de pirarbo, bonvolu rigardi tion.” Li elprenis bulon da longa ŝnuro de la kesto apud li. Li malŝnuris la bulon kaj forte ĵetis la ŝnuron en la ĉielon prenante la finon de la ŝnuro permane. La ĵetita ŝnuro ne venis malsupren, ĉar la aliflanka ekstremo de la ŝnuro ŝajne kroĉiĝis al io. Ne nur tio, li malŝnuris la bulon iom post iom kaj la ŝnuro facile supreniris en la ĉielon, kvazaŭ iu altirus la ŝnuron permane. Finfine la ekstremo de la ŝnuro malaperis en la nubon. Kiam la ŝnuro preskaŭ ne restis

ĉe li, la avĉjo abrupte kunŝnuris la korpon de la knabo per la restanta ŝnuro. Kaj diris, “Knabaĉo, iru.

Mi povus iri, sed mi estas iomete peza. Estu pacienca iomete! Iru! Ŝtelu fruktojn de pirarbo kaj alportu ĉi tien.” Tiam la knabo



plorante diris, “Avĉjo, pardonon. Se la ŝnuro rompiĝos kaj mi falos de alta loko, mi mortos. Mi petegas vin. Pardonu min.” La avĉjo ne akceptis la peton. Li nur urĝis la knabon hasti. La rezignanta knabo plorante ekgrimpis supren kvazaŭ simio per la ŝnuro pendants de sur la ĉielo.

La figuro de la knabo malgrandiĝis iom post iom laŭ lia supreniro. Finfine li malaperis en la nubon. Ĉiuj mirege rigardis la ĉielon kun malfermita buŝo.

Tiam neatendite la granda frukto de pirarbo falis ĉi tien. Ĝi estis tiom granda frukto de pirarbo, kiun oni ne vidis antaŭe. Ĝi estis kiel akvomelono. En tiu momento la avĉjo ridetante deprenis ĝin kaj invitis unu el spektantoj apude starantaj por manĝi ĝin. Ĝuste tiam de sur la ĉielo longa ŝnuro glite falis. En la momento la ŝnuro grimpis malsupren kaj fariĝis monto da ŝnuro tuj antaŭ la okuloj de la avĉjo. En tiu momento la avĉjo kriis kun pala vizaĝo. “Dio mia! Kiel mia nepo fariĝis? Kiel li malsupren venos?”

Samtempe io abrupte falis kun grandega sono “Bum”. Ĝi estis la kapo de la knabo. “Ho, terure! La nepo estis certe arestita kaj lia kapo estis dehakita de ĝardenisto en la ĉielo, kiam li ŝtelis la frukton de pirarbo. Kial mi instigis lin iri al tiel terura loko? Kial vi ĉiuj diris tian maleblaĵon por akiri la frukton de pirarbo? Kompatinde! Mia unu sola nepo fariĝis tute mizera figuro. Ho ve malfeliĉe!”

Dirinte tion la avĉjo plorkriante brakumis la kapon de la knabo. Dume ambaŭ manoj dise falis. Dekstra kaj maldekstra piedoj dise falis. Fine la korpo de la knabo brue falis de la ĉielo. De la unua falo de la korpo mi tre tremis pro teruro. Amaso da spektantoj paliĝis kaj neniu povis paroli. Plorante la avĉjo kolektis manojn, piedojn kaj korpon kaj enmetis ilin en la keston. Kaj fine li enmetis la kapon en ĝin. Sekve li diris al spektantoj. “Tiu ĉi knabo estas mia unusola nepo. Ĝis nun ĉiam ajn kiam mi vojaĝis, mi iris kune kun la knabo. De nun mi fariĝos nur unu. Mi devas forlasi mian okupon. Mi havos funebbron de la knabo kaj retiriĝos en la monton. Nu, karaj ĉeestantoj! La nepo mortis pro la frukto de pirarbo, kiun vi ĉiuj postulis havi. Mi petas vin iom almozon por funebri la knabon.” Aŭdinte tion

ĉiuj virinaj spektantoj laŭte ekploris. La avĉjo petis monoferon al ĉiuj spektantoj etendante siajn manojn. Preskaŭ ĉiuj donis monon sur la manojn de la avĉjo foruzante la lastan moneron. Mia nutristino ankaŭ donis la tutan monon en sia monujo.

Kiam la avĉjo tute kolektadis monon, li aliris al la kesto kaj frapetis sur ĝin kelke da fojoj. La avĉjo diris, “Knabaĉo!, knabaĉo! Rapide eliru el la kesto. Kaj esprimu dankemon al la spektantoj.” Tiam aŭdiĝis malgranda sono. Ĝuste tiam la kovrilo de la kesto malfermiĝis per si mem kaj la knabo ekaperis de la kesto. La knabo, kiu estas senvunda kaj ankaŭ havas kapon, manojn kaj piedojn, ekstaris antaŭ ĉiuj spektantoj. Baldaŭ la knabo kaj la avĉjo malaperis en la amason da homoj portante la keston kaj ŝnuron.

*(noto) turbo: helik-forma konkulo, ofte kun pli ol 10 cm da longeco.

Oni kuiras ĝian karnon, utiligante la konkon mem kiel kuirujon.

(scienca nomo: *Turbo cornutus*; japanlingve: *sazae*)



NEKROLOGO

S-ro YAMAZAKI Masaru
(1933-07-20 ĝis 2012-01-12)

En 1983, en ekspozicio en parko en Jokohamo, li interesita skribis sian nomon en kajero de Jokohama Esperanto-Rondo, sed tiam li, estis forveturonta al Saudi-Arabio kiel elektrokomunika inĝeniero. En 1985, li fine eklernis Esperanton. Poste li aktivis, jen koresponde, jen UK-e. Li gvidis kursojn en Hama-Rondo. De 2006 lin atakis kancero, kio fine rabis de li la vivon. Lia plejlasta esperanta verko aperis en la 2010-a julia numero de "Novaĵoj Tamtamas".